

Redakcia informo

Jen n-ro 183 de Scienca Revuo. Kaj vi, karaj ISAEanoj kaj fidelaj legantoj de nia asocia organo estas la unuaj personoj, kiuj vidas (en paĝo 26/27 de tiu ĉi kajero) la bildojn -eĉ kolorajn- de krabospecio, kiun aliaj sciencistoj ĝis nun neniam vidis, ĉar la priskribata kraba pluarbara vivmedio estas tute nova por la scienco!

Same kiel en Scienca Revuo n-ro 171 de la 1997a jarkolekto estis aperinta dulingva artikolo (Esperanta + germana, pri muziko) kaj ankaŭ en n-ro 172 (Esperanta + hispana, pri ĥemio), ni daŭrigas la okazan aperigon de sciencaj artikoloj **paralele en internacia kaj nacia lingvoj** ankaŭ en tiu ĉi kajero (Esperanta + angla, pri zoologio) per la artikolo de profesoro *Cumberlidge* kaj kunaŭtoro pri la enkonduke menciita neordinara biotopo de krabo vivanta en arbotruoj. La originale en Esperanto verkitaj artikoloj estas kaj restos la piliero, sur kiun apogas sin nia asocia organo. Sed por akceptigi esperantlingvan periodaĵon en universitataj kaj aliaj bibliotekoj, la okaza apero de nacilingva originala artikolo (kun internacilingva ekvivalento) estas, laŭ mia longjara sperto en la internacia akademio vivo, absolute esenca.

Kelkaj neesperantlingvaj sciencistoj miras, kial aŭtoroj publikigas siajn prifakajn tekstojn ne en iu 'pli renoma' kaj 'por persona prestiĝo pli valora' nacilingva -precipe angla - periodaĵo. Tie ili certe trovos pli grandan legantaron ol havas Scienca Revuo, kaj pli multajn interesitajn samfakulojn. Ke tio ne estas vera, tion komunikis d-ro *Stampa* kiam li sendis el Sudafriko sian kunaŭtoran artikolon pri reutiligado de naturaj paŝtejoj en sekaj regionoj. Kun diversfaka legantaro kaj per uzado ne de nacia sed de internacia komuniklingvo, nome Esperanto, lia opinio estos pere de Scienca Revuo alparolata tute nova, tute alia legantogrupo. En tiuspeca internacilingva grupo certe troviĝas homoj de treege diversaj profesioj kaj fakinteresitaj praktikuloj. De tiom diversa legantaro oni povas atendi novajn impulsojn - eble ankaŭ por la urĝe necesa ĉesigo de la dezertiĝo kaj la totala neniigo de nunaj steporegionoj. Ke aŭtoroj eĉ kuraĝe publikigas kaj science priskribas en Esperanto nove trovitajn plantospeciojn en Scienca Revuo anstataŭ en nacilingva fakjurnalo, tion pruvas d-ro *Laferrière* en sia artikolo pri maloftaj plantoj en Arizono.

Fine, la rubriko 'Scienca eĥo' kun sciindaĵoj trovitaj en gravaj sciencaj periodaĵoj estas ree ekzemplo, ke Esperanto trafe kapablas densigi, komprenigi kaj reeĥi tiuspecajn sciindaĵojn el la tuta mondo. Per tio Scienca Revuo denove montras, ke ĝi firme kaj konscie sekvas la asocian celon: 'esti ligilo inter fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj'.

Prof. Dr. R. Sachs
Prezidanto de ISAE

Paŝtejoj en sekaj regionoj

S. STAMPA, R. SACHS & A. STAMPA

Resumo

La strebado al komuna homa bonstato, kiu sin apogas sur prudenta kaj libervola konscio de unuopuloj, havas malvastajn limojn. Ĉu malsato en tropikaj landoj estas pli socia ol agrikultura tragedio, kiu baziĝas - same hodiaŭ kiel en pli fruaj tempoj - sur kutime praktikita komuna posedaĵo kaj troa ekspluatado? Paŝtado de tro granda nombro da brutoj sur tribopropraj paŝtejoj rezultigas ruiniĝon kaj pereon de paŝteja vegetaĵaro. Malgraŭ la antaŭvidebla longtempa damaĝo la tragedio daŭre ripetiĝas - kaj ripetiĝos tiom longe kiom la nombro, sed ne la produktiveco, de hejmaj bestoj estas signo pri reputacio kaj socia rango de unuopuloj. Tio koncernas ne nur la sudan kaj nordan partojn de Afriko, sed la enloĝantojn kaj politikajn respondeculojn de ĉiuj dezertaj regionoj en la mondo.

La aŭtoroj okupiĝis pri tiu problemo dum pli ol 30 jaroj da esplorlaboro en Sudafriko, Namibio kaj Angolo. La problemo estas modelo de tradicia homa kondutmaniero pri komuna posedaĵo. Tiu modelo fakte estas komparebla al la hodiaŭa mondvaste neadekvata naturprotektado, al la detrua senarbarigo, al la komuna misuzo de akvo kaj aero ĉie en la mondo. Longjara neglekto de longtempaj necesoj favore al mallongtempa kontentigo de homaj bezonoj aŭ pretendoj estas la baza kerno de la multifacetaj krizosimptomoj en la mondo, el kiuj elstaras precipe la mondvasta detruo de la naturaj homaj kaj bestaj vivospacoj sur la Tero.

Enkonduko

Grandaj partoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio ricevas malmultan, aŭ de jaro al jaro treege varian, pluvokvanton. Samtempe la kvoto da forvaporigado en tiuj regionoj estas tre alta.

Plugkampaj agrikulturo kaj kultivado de fruktoj prosperos nur tie, kie eblas kampara irigacio. La malgranda akvokvanto el flufontoj,